

Robert Burns,

## Vi bordoj de la bela Dun'

*tradukita de Agnes B. Deans*

Vi bordoj de la bela Dun',  
ho, kiel povas flori vi?  
Ho, kial kantas vi, birdar',  
dum zorgoplena estas mi?

Trilanta birdo de l' arbar'.  
Komencas krevi mia kor';  
aŭdante vin, memoras mi  
pir ĝojoj jam pasintaj for.

Mi ofte, ho belega Dun',  
senzorge vagis apud vi;  
pri amo kantis ĉiu bird',  
kaj same ĝoje kantis mi.

Kun koro ĝoja for de l' arb'  
rozeton dolĉan prenis mi;  
aminto mia ŝtelis ĝin,  
sed akran dornon lasis li.

...

*Traduko de la Scottish poemo “Ye banks and braes o’ bonnie Doon” de ROBERT BURNS (\*1759-01-25 – †1796-07-21) en Esperanton de Agnes B. Deans.*

*Arg-1024-2076 (2014-06-02 07:40:33)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsi-ko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Vidu ankaŭ: <http://www.reocities.com/lilandr/kantoj/popolaj/skotaj/ViBordojDeLaBelaDun1.htm>. La muziknotoj de la kantoj troveblas en [http://books.google.de/books?id=bvyS1UxGBUC&pg=PA591&lpg=PA591&dq=Robin+Adair+Robert+Burns&source=bl&ots=iUqYPvA3na&ig=GzREVUt2liw\\_lm6uNXidZEC6Xqk&hl=de&sa= &ei=MXKEU6GhMaiA4gTBz4CYAw&redir\\_esc=y#v=onepage&q=Robin+Adair+Robert+Burns&f=false](http://books.google.de/books?id=bvyS1UxGBUC&pg=PA591&lpg=PA591&dq=Robin+Adair+Robert+Burns&source=bl&ots=iUqYPvA3na&ig=GzREVUt2liw_lm6uNXidZEC6Xqk&hl=de&sa= &ei=MXKEU6GhMaiA4gTBz4CYAw&redir_esc=y#v=onepage&q=Robin+Adair+Robert+Burns&f=false), sur paĝo 442.*